GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO

NIA PONTO

Barrencalle Barrena, 7 - 1.º
Telefono 416 44 92
48005 - BILBAO

2ª jaro Aprilo 1988 Numero 8 (2)

K O N G R E S U (se vi povas)

Diversmaniere vi povas praktiki Esperanton, ne nur per grupaj rondkonversacioj, per legado de bonaj libroj, per korespondado, per poeziaj deklamoj, aŭ eĉ per privataj amkonfesoj, ĉiuj estas rekomendindaj taskoj, sed neniu el ili superas la kvaliton kiun vi atingas dum viaj kongresaj partoprenoj.

Du kaŭzoj ludas specialan rolon. Unue vi kaptas la diversajn stilojn per kiuj,tiel la publikaj disertantoj sin esprimas, kiel la kongresanoj parolas unu la alian, kaj vi, kurioza observanto, facile rimarkas la plej belan nuancon kiu tuj kaptas vin, kaj due ĉar la kongresoj estas ne nur la sopirata atingo dum viaj revoj de esperantaj studoj kaj la vera apogo al la laboremaj organizantoj, tiamaj suferantoj, sed ĉefe ĉar pere de la kongresoj, la disvastigo de Esperanto farigas pli intensa,trafas la superajn instancojn kaj ankaŭ la simplajn civitanojn, kiuj pli poste helpos nin, paŝo post paŝo, por konigi la veran sencon de nia lingvo.



Jen, la motivo de nia nuna tasko. LA 49ª HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO EN BILBAO DUM 1989, kaj nia arda deziro pri la atingo de via necesa helpo, dum nia bone komencita laboro marŝas.

NIA ĜENERALA JARKUNVENO

Kiel ordinare trakuris glate la ĉiujara kunveno de nia Grupo, kiu okazis la 10an de Marto kaj kiun ĉeestis nur 18 membroj por pritrakti kaj juĝi la laboron de nia Estraro dum la pasinta jaro.

Unanimajn aprobojn oni donis al la Akto de la pasinta kunveno, al la Memuaro kaj Bilanco de 1987 kaj al la Buĝeto por 1988, kiujn oni tralegis.

Oni aŭdis ampleksan rezumon pri la kalkuloj kaj laboroj rilate la riparoj de la domo kie situas nia Sidejo kaj oni aprobis la decidon de nia Estraro pri la okazigo de la 49ª Hispana Kongreso de Esperanto en nia urbo.

Renovigis, laŭ Statute, parton de la Estraro. kiu post la aprobo restas jene:

PREZIDANTO: Sro. Jesús Miguel Garcia iturrioz
VICPREZIDANTO: Sro. Tomás Apraiz Riberas
KASISTO: Sro. Teodoro Ibañez Martín
SEKRETARIO: Sro. Iñaki Velez Ortiz
VOĈDONANTOJ: S-ino. Frieda van Houten
F-ino. Keti Sesmero Cutanda

Kaj fine ni aŭdis sugestojn por plibonigi la enhavonde "Nia Ponto" , kio supozigas nin ke niaj nunaj redaktoroj havos la necesan apogon de kunlaborantoj kiu ilin stimulos.

GRUPAJ NOVAĴOJ

SOCIŜANĜOJ.- Lasttempe, nova malbona novaĵo alvenis ĉe nin: morto de nia veterana aktivulo Sro. PEDRO INFANTE LOPEZ DE ALDA, unu el la fondintoj de la G.E.B., en ĝia aktuala epoko. KE LI PACE RIPOZU!.

Ankaŭ ni bedaŭris eksiĝojn, propravole, de niaj amikoj LUIS Mª DE BARANDIARAN Y SARACHAGA, kaj ESTEBAN GONZALEZ JUARROS.

.../...

Samtempe ni bonvenigas tri novajn membrojn de nia Asocio, ili ĉiuj tre aktivaj, almenaŭ ĝis nun: S-ino. FRIEDA VAN HOUTEN, CELESTINO GOMEZ CUEVAS (Geedzoj) kaj FELIX ARRIBAS DEL ALAMO.

Post ĉio-ĉi, ni nombras 125 sociojn.

NORDHISPANA KUNVENO.- La pasintan dimanĉon 20^an de Marto, post alvoko de Sno. Miguel Gutiérrez Adúriz, 4 membroj de G.E.B. voĝaĝis al Santandero por ĉeesti kunsidon de estraranoj de Kantabra Esperanto-Asocio, Astura Esperanto-Asocio kaj nia klubo.

Krom ekkoni unu la vizaĝojn de la aliaj (vere grava atingaĵo), ni priparolis diversajn interesajn temojn, precipe organizajn kaj monajn: peto de subvencioj, komuna aĉeto de libroj, interŝanĝo de informoj pri lernolibroj, kurspropagando, k.t.p., k.t.p.

Antaŭ ol vespera adiaŭo, ni ĉiuj konsentis pri reokazigo de similaj kunvenoj (ĉu en Bilbao, ĉu en Ĥiĥono, ĉu en Santandero) kaj, intertempe, pri pli oftaj interrilatoj. KE TIEL ESTU!.

MUY IMPORTANTE.- Dadas las excesivas cantidades que Bancos y Cajas de Ahorros detraen del dinero de las cuotas de socios cuando éstas son cobradas a través de ellos, como experiencia, este año, hemos pensado abrir un plazo para que los socios ingresen directamente el importe de su cuota anual en nuestra cuenta corriente, con lo que se evitan tales gastos. Pasado este plazo, recurriremos al cobro del dinero no ingresado en la forma ordinaria, a pesar de las molestias y gastos que nos ocasiona.

Así, hasta el 22 de Mayo, podéis ingresar el importe de vuestra cuota anual directamente en nuestra cuenta corriente de la Caja de Ahorros Vizcaína número


20/218-155-0

(¡Ah!, y que no se os olvide indicar vuestro nombre)

Dissemitaj tra Eŭropo aktivas pluraj esperantaj kulturaj institucioj kiuj proponas al la internacia esperantistaro la plej variajn programojn: kursojn, seminariojn, staĝojn, ... LEGU kaj KONU sekve pri TRI el la plej KONATAJ kaj SPERTINDAJ.

LA ESPERANTISTA KULTURDOMO KASTELO GRÉSILLON

F-49150 Baugé, Francio



Ĉi tiu kastelo, nomata Grésillon, situas inter Baugé, malnova urbeto, kaj Pontigné, kampara komunumo, en la departamento Maine-et-Loire, nomata laŭ la du ĉefaj trapasantaj riveroj. Ĉirkaŭ la kastela bieno etendiĝas la fama "Val de Loire" regione tre konata pro siaj kasteloj.

La kastelo, aĉetita por la koopera asocio Kulturdomo de la Franclandaj Esperantistoj, malfermis siajn pordojn al la esperantistaro jam en julio de 1952.

La ĉefa ekzistokialo de la Kulturdomo estas pedagogia kaj ĝia ĉefa aranĝo dekomence estas la Somera Lernejo. Al tio aldoniĝas aliaj pedagogiaj aranĝoj kaj infanrenkontiĝoj je Pasko.

La paska programo evoluas ĉirkaŭ la instruado de Esperanto al infanoj en lerneja medio. La somera programo ampleksas la plej diversajn kulturajn kaj distrajn aranĝojn, kaj kursojn por komencantoj, progresantoj kaj kursgvidontoj.

Ekster la datoj de siaj aranĝoj la Asocio disponigas la riĉon de sia bieno -loĝebleco por 90 personoj, tendumejo, manĝebleco, ĉambroj, salonoj, aŭdvidaj aparatoj, 17-hektara parko kun arbaro, lago kaj naĝejo- al aliaj Esperantoj-organizaĵoj.

Krom la lingvokursoj kaj prestiĝaj internaciaj E-ekzamenoj pri akirita lingvonivelo, estas provizata al la grezijonanoj instruado pri diversaj metioj, kiel: korbo-farado, librobindado, parlado, nodarto kaj fotado. La lingvo de la instruado -kiel de ĉio okazanta en la bieno - estas, kompreneble, Esperanto.

Aldone al siaj surbienaj aktivaĵoj la Asocio eldonas librojn kaj la dumonatan revuon "Kulturaj kajeroj".

La Kulturdomo Grésillon estas voluntule estrata de esperantistoj el kiu ajn lando, de kiu ajn kredo religia aŭ politika.



KCE KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

Pf. 771, CH-2301
La Chaux-de-Fonds,
Svislando


Ĉi tiujn sep flavajn domojn, situitaj en vastaj ĝardenoj, fakte formas tre agrablan Esperanto-kvartalon de la svisa urbo La Chaux-de-Fonds.

Fondiĝis ĉi tiun esperantan institucion en 1968 kiel frukto de kunlabora agado kun la prezisa celo starigi altlernejon por moderne instrui Esperanton.

En preskaŭ ĉiuj la monatoj de la jaro disvolviĝas Esperanto-staĝoj por komencantoj kaj progresantoj kun prestiĝan avangardan didaktikon, ne nur en Esperantujo, sed ankaŭ konkurence al la fremdlingva instruado ĝenerale; Karakterizas tiun didaktikon perbilda, pergesta kaj programita instruteknikoj. Grupestroj kaj pedagogoj ŝatas trovi en tiuj staĝoj inspiron al pli efika didaktiko.

La formulo de KCE estas "Studi feriante". Tiu signifas, ke la kursoj, kolokvoj, seminarioj, kiujn ĝi organizas, disvolviĝas ĉefe en la mateno, por ke la partoprenantoj povu konatiĝi kun la regiono posttagmeze: alsupri kaj migradi en la apuda montaro Ĵuraso aŭ kiam la vetero malbonas, viziti la urbaj muzeoj kaj magazenoj, kaj al tiuj kiuj pasiiĝas pri Esperanto aŭ pri interlingvistiko CDELI, la konata Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia, kiu estas fako de la Urba Biblioteko.

La Chaux-de-Fonds estas vere unu el la mondaj centroj de Esperanto (instruado, esplorado, seminarioj, ktp.); Unu el tiuj priviligiaj lokoj, kie oni sentas, ke Esperanto estas fakta realaĵo.



INTERNACIA ESPERANTO KURSEJO Pisanica (BULGARIO)
(Pisanica), Pf. 791, BG-1090 Sofia, Bulgario

En la meza parto de la bela montaro Rodopoj en Bulgario, inter la domoj dissemitaj sur la krutaj altaĵoj, en Pisanica, apud la urbo Smoljan, troviĝas neĝblanka konstruaĵo de rava alpeca aspekto. Super ĝi staras granda verda lumstelo kaj sur la fronta fasado de malproksime vidiĝas la lumsildo "Internacia Esperanto-Kursejo", vera Esperanto-palaco en la montaro de la legenda traca muzikisto Orfeo.

Apartenanta al Bulgara Esperanto-Asocio, ĉi tiun Esperanto-domon malfermis siajn pordojn al bulgaraj kaj eksterlandaj esperantistoj en 1979.

La kursejo -kiu havas kapaciton por samtempe loĝigi 200 personojn- funkcias tra la tuta jaro: organizas kursojn en tre bonaj kaj modernaj lernokondiĉoj kaj disponas ankaŭ pri ĉiuj necesaj laborkondiĉoj por konferencoj, kunsidoj kaj aliaj Esperanto-aranĝoj, landaj kaj internaciaj.

Ĉiun labortagon antaŭ-tagmeze okzas po 4 horoj da lernado de E-o. Posttagmeze oni faras interesajn ekskursojn tra la vizitinda ĉirkaŭaĵo, sportaj ludoj, amuzaj vesperoj en bone ekipita diskoteko, projekciado de lumbildoj kaj filmoj, prelegoj pri la Esperanto-movado kaj pri Bulgario.

Kun siaj ĉiam verdaj pinarboj, vastaj herbejoj, originala arkitekturo, komfortaj loĝeblecoj, vizitinda ĉirkaŭaĵo, riĉa kaj varia restadprogramo, kun la ebleco perfektigi sian konon de la Internacia Lingvo, la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica estas io unika kaj tial spertinda.







"Matene lerni, posttagmeze ferii" — sub tiu devizo IEK-Pisanica daŭrigas sian edukan tradicion.


MAŜIN-TRADUKADO

Pasintan Januaron estis prezentita en gazetara konferenco ĉe la esplorejo de l'firmao BSO en Utrecht, Nederlando la prototipa sistemo DTL (Distribuita Linngvo-Tradukado) por disvolvi komputilajn programojn por aŭtomata tradukado, uzante Esperanto kiel pontolingvo.

Tiel funkcias la DTL-sistemo (tre simpligite): Definita teksto en iu ajn lingvo estas tradukita al interlingvo (IL) kaj poste la tradukoj estas enigataj en reton inter komputiloj, kiu disvastiĝas trans landlimoj kaj al kiu multaj entreprenoj estas konektitaj. -Kvankam beletra lingvo ankoraŭ ne estas tradukebla, DTL atingis stadion, ke specialista redaktoro por korekti la tradukitan tekston ne plu estas bezonata.-

Se oni volus rekte traduki inter 15 malsamaj lingvoj, oni bezonus por traduki el unu lingvo al la aliaj 14 programoj (moduloj), sed por ĉiuj 15 lingvoj: 15 oble 14 = 210 modulojn. DTL faras tion pli ekonomie uzante Esperanton kiel pontolingvon. Por traduki el ĉiuj 15 fontlingvoj al IL oni bezonas 15 modulojn, por traduki el IL al la 15 cellingvoj ankaŭ, do entute nur 30 modulojn.

La ideo ke Esperanto povus funkcii kiel komputila interlingvo por la multlingva tradukado da informoj jam en 1982 naskiĝis. Kaj de tiu ek-funkcio de esplor kaj evoluiga projekto (1984) ĝis la disvolvo de l'prototipo por traduki el teknika angla lingvo al franca (1988), la elspezoj estis 360 milionoj da p-toj(duone venis de la nederlanda ŝtato,duone de BSO), kaj ĝis 1992 pliaj 700 milionoj estos necesaj por perfektigi la prototipon por la merkato kaj komenci la plivastigon al 2 aŭ 3 pliaj lingvoj.



Komunika reto inter entreprenoj en diversaj landoj. Tra tiu iras la tradukita teksto en IL (Esperanto) en elektra formo. Ĉiu komputilo havas programojn (modulojn) por traduki inter IL kaj la nacia lingvo.

ESPAROL
paroligas vian komputilon esperante

En la Budapeŝta Teknika Universitato esploristoj ellaboris la aŭtomatan sintezon de Esperanto. La sistemo ESPAROL povas eldiri kun konvena intonacio ĉiujn esperantajn tekstojn skribitajn laŭ la normala ortografio; ĝi prononcas ankaŭ numerojn kaj aliajn specialajn karaktrojn troviĝantajn sur la klavaro (= + % ktp.)

Per simpla programo en la programlingvo BASIC oni povas voĉigi pli longajn tekstojn ankaŭ kun variabloj; paroligi la maŝinon diversrapide, flustre aŭ raŭke, eĉ eblas enprogramigi kantojn.

La sistemo konsistas el aparato konektebla al mikrokomputilo *Commodore '64* aŭ *'128* kaj el programo sur disketo. (Tiu ĉi tuto estas nun ekvendata kontraŭ 350 germanaj markoj.) La varianto por *IBM* persona komputilo kaj al ĝi kongruaj estas evoluigata. (La enmetebla karto kun programo kostos ĉ. 550 germanajn markojn.)

Laŭ nia scio ESPAROL estas la unua parolsinteza produkto por vaste uzataj mikrokomputiloj.

La sistemon eblas konekti kun optika legilo ellaborita en la hungara komputika esplorinstituto SZKI. Tiel malbone vidantaj aŭ okupitaj homoj povas aŭskulti komputile laŭtlegitajn tekstojn.

La evoluigantoj de ESPAROL, Ilona Koutny, d-ro Gábor Olaszy kaj d-ro Lászlo Czapp laboras nun pri aplikoj kun studentoj. Pretiĝas paroluanta instruprogramo por Esperanto kaj ludoj uzeblaj en instruado. Ĝi povas servi ankaŭ en la provlegado de komputile kompostitaj tekstoj.

Ĉiu uzanto mem povas fari simplajn BASIC-programojn por utiligi la parolkapablon laŭ siaj deziroj.

Pluaj informoj ĉe I. Koutny (Budapeŝta Teknika Universitato, Budapest. Stoczek u. 2., H-1111, Hungario).

BILDSTRIOJ (Bildrakontoj)

Ĉu vi ŝatas la bildstriojn? Ĉu vi jam scias ke du el iliaj plej konataj herooj - Asteriks kaj Tinĉjo (Tintin)- parolas ankaŭ esperante?

Aperis ĝis nun tri volumoj-albumoj bunte ilustritaj-.

VI TROVOS ILIN EN NIA BIBLIOTEKO ...





... KAJ EN LA LIBROSERVO ĐE LA GRUPO.





